


# PONTO ☆

*Jaro 3 N-ro 3(17) Organo de Sunda Esperanto Agado junio 2004*

## La jarkongresoj en Lesjöfors 2004

Ĉijara Sveda Esperanto-Kongreso okazis en Lesjöfors 20-23 de majo kune kun la jarkunvenoj de Eldona Societo Esperanto kaj sveda sekcio de ILEI.

Sten Svenonius estis elektita gvidi la jarkunsidon de SEF, kiu sub intensa laboro daŭris 5 horojn.




Enspezoj de membrokotizoj falas. Ĉar la E-Centro en Stokholmo estas grava parto de la budĝeto la diskuto temis pri senigo de ĝi. La kluboj en Göteborg, Malmö kaj Västerås anoncis sin pretaj esplori la eblecon preni sur sin la taskojn por kiuj estas bezonata ejo.

La Espero estas bone redaktata de Leif Nordenstorm. Kelkaj deziris pli da utilaj informoj pri la agado por esperanto, kaj la kluboj estis admonataj sendi materialon al la redaktoro. La Espero estas malofta informilo kaj la membroj bezonas informojn ankaŭ interrete kaj pro tio gravas aktuala retpaĝo.

Propono estis pri decido pri kongresloko jam dum la okazanta kongreso. Estis manko ke la estraro ne sendis la kongresajn dokumentojn al la partoprenontoj jam antaŭ la kongreso.
Alia akceptita propono estis ke SEF kaj la kluboj faru laborplanon por la venonta jaro.
La jarkunsido ankaŭ reviziis la statutojn. Unu grava ŝango estas ke SEF havos nur individuajn membrojn, ĉiuj kun voĉdonrajto en la jarkunsido, se venontjare la propono konfirmiĝos.
Franko Luin estis reelektita kiel prezidanto por unu jaro.

Franko Luin invitis nin al jarkongreso en Haninge 2005. En 2006 kaj SEF kaj Klubo Esperantista de Malmö festos siajn 100-jarajn jubileojn. Pro tio Sten Svenonius invitis al jarkongreso en Malmö 2006. Tiu kongreso okazos kune kun Dana Esperanto Asocio, kiu jam akceptis la inviton.

Karin Lindquist

## Raporto pri la jarkunveno de Dana Esperanto Asocio 23-25 de aprilo 2004



La programo dum sabato estis altkvalita kaj treege interesa. Unue la konata lingvisto Robert Phillipson en bela kaj klara dana lingvo prelegis pri ”Lingva politiko: kiuj utopioj estas realismaj?” Li inter alie rakontis, ke en EU oni havas malsamajn opiniojn pri lingvoj kaj lingvopolitiko kaj ke la temo estas tikla. Li raportis, ke la dana lingvopolitiko neglektas la lingvojn de la enmigrintoj kaj ne zorgas pri plurlingvismo. Post la prelego ni havis la bonŝancon aĉeti lian libron “Ĉu nur-angla Eŭropo?”, ĝuste la saman tagon aperantan en esperanta traduko de István Ertl.

Birthe Lapenna faris prelegon pri “La du konceptoj de Ivo Lapenna: ‘Aktiva Neŭtraleco’ kaj ‘Humaneca Internaciismo’ ”.

La tria interesega programpunkto dum sabato estis ne vera prelego, sed Eliza Kehlet libere kaj atentokapte rakontis pri siaj ”Praktikaj spertoj kiel interpretisto en Bruselo”. Ni lernis pri diversaj formoj de interpretado – postsekva, samtempa, simetria, relajsa kaj revena (nesimetria) – kaj iomete konatiĝis kun la laboro en la Eŭropa Parlamento.

La dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al la ĝeneralkunvenoj de DEA kaj de la revivigita junulara organizo DEJO. Ileana Schrøder estis reelektita kiel prezidanto de DEA. La laborplano de la asocio sekvas tiun de UEA pri Informado, Instruado kaj Utiligado.
DEA, helpe de la Ministerio pri Edukado, eldonis novan version de la ”Ŝlosilo” kaj renovigis sian retpaĝon.
Ekzistas planoj meti la organon ”Esperanto en Danio” en la retpaĝo.
Oni organizos kursojn por komencantoj, daŭrigantoj kaj instruantoj, laŭeble en kunlaboro kun SEA (Sunda Esperanto-Agado).

Entute estis sukcesa aranĝo, bone aranĝita en amikeca etoso kun interesa programo. Mi vere ĝojas pro tio, ke mi decidis partopreni la jarkunvenon de DEA.

Ann-Louise Åkerlund

Nästa **Ponto**, nr 4
utkommer ca 10 sept.
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 20 aug.

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté*/redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 75 N-ro 3 (686)* >>Ĉiam antaŭen<<

Fondita en 1906


*Agrablan kaj enhavoriĉan someron deziras la estraro kaj la redakcio!*

### Viva gazeto 4.2

De ĉeĥa kaj japana amikinoj Asta Schaedel ricevis longajn leterojn post UK en Göteborg. Ŝi laŭtlegis partojn de ili, kiuj donis interesajn bildojn pri eksterlandaj vidoj de nia lando kaj la kongreso.

La naturprotektejo de Abisko estis celo por vojaĝo de Agneta Lund, kiu montrante bildojn kaj broŝurojn rakontis pri diversaj aspektoj de tiu norda regiono.

Fine ni parolis pri amuzaj proverboj trovitaj de Asta, ekz. de Ukrainio: Estas pli facile babili ol ion diri.

Gertrud Lund

### Libroaŭkcio 3.3

La ĉeestantoj povis fari verajn bonaĉetojn kiam Alf Mobark diligente gvidis la vendadon, kaj la kaso ricevis bonvenan kontribuon.

Gertrud Lund

## Kurser:

**Litteratur- och konversations-kursen äger rum på måndagar kl. 15.00-16.30, (obs ändrad tid) i klubblokalen med start den 15 sept. Även tillfälliga besökare är välkomna. Ledare Kjell Persson. Tel. 040-40 15 03**


**Krome estas planoj unufoje monate renkontiĝi por ekzerci la lingvon antau la jubilea kongreso en 2006.**


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


### "Levu la rigardon ĉielen!"

La printempa festo en Malmö la 17-an de aprilo ŝvebigis nin en la nordan stelan ĉielon helpe de la astronomia instruisto Mogens Rude Andersen el Danio.




La interesa prelego estis treege pedagogie prezentita per lumbildoj de la bestoj en la zodiako kaj aliaj stelkonstelacioj.

En la scienca prelego multaj amuzaj fabeloj estis enplektitaj.
Ke la polusa stelo en la Malgranda Urso tre gravis dum la navigado sur la maroj en la pasinta tempo sen modernaj instrumentoj ankaŭ klare kompreniĝis per la bildoj.

La enkadrigo de la festo estis bele printempe aranĝitaj manĝotabloj sur tukoj plenaj de bluaj anemonoj. La gastoj bonvenigis la printempon per unisona kantado de la tria verso el 'La unuan fojon...' de Birger Sjöberg antaŭ ol ni ekatakis la bufedon.

Ni kore dankas la aranĝintojn por la granda zorgo dediĉita al la festo.

Jill kaj Barbro el Helsingborg

### La 28-an de aprilo

ni havis vesperon pri memoraĵoj. Ni trovis malnovan legolibron, lignan laponvirinon, trovitan en pulbazaro en Arvidsjaur, kaj ornamitan spegulplaton kiu siatempe estis premio en skikonkurso.
Ni kun granda intereso provis rekoni esperantistojn de malnovaj diapozitivaj bildoj. Fine ni povis admiri ultramodernan vekhorloĝon direktitan de Germanio kaj kun la tagnomoj en diversaj lingvoj. Entute interesa vespero

Asta Schaedel

### Kunsido 12.5

Sub la prezido de Gerd Rodén la lasta kunsido de la printempo havis lokon.
Estis diskutataj la kursoj okazontaj dum la aŭtuno. Ĝis nun nur tiu de la literatura- kaj konversacia grupo estas decidita.
La tagoj planitaj por kunvenoj kaj aliaj aranĝoj estas:

Sab. 28.08 Tago de la Asocioj en Gustav Adolfs torg
Sab. 04.09 La bicikla grupo informos en la urbo, b.v. kontakti Sten Svenonius tel. 040-191477 se vi volas partopreni.
Dim. 05.09 Aŭtuna festo en Beijers park aranĝota de la urboparto. Nia klubo informos.
Mer. 08.09 Ordinara kunsido. Poste raportoj pri la kongresoj en Lesjöfors.
Mer. 22.09 Someraj travivaĵoj.
Sab. 16.10 Aŭtuna festo
Mer. 27.10 Kunveno
Mer. 10.11 Ordinara kunsido
Dim. 21.11 Aŭkcio
Mer. 08.12 Kunveno

Post la kunsido la vespero daŭris per komuna babilado.

Gertrud Lund

### Elsa Davidsson 1913-2003

En 1947 Elsa membriĝis en KEM. Mi memoras ŝin kiel tre simpatian homon, kies societon ĉe kunvenoj mi volonte akceptis.



Dank´al parencino de Elsa ni ricevis kelkajn fotojn kaj buŝan informon pri kiel alte Elsa taksis Esperanton.
De la ricevitaj fotoj mi ankaŭ konstatas, ke ŝi vizitis kursojn en Elsinoro 1936 kaj 1947, kaj en 1934 ĉeestis printempan feston de nia klubo kaj antaŭkongreson de Malmö 1934.

Gulli Svensson

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
*Kopenhago*

N-ro 3 (656) junio 2004 68-a jaro



**Informoj**
*Kutimaj horoj* en la klubo: kafo/teo-trinkado 19.30-20.00
Komuna manĝado la unuan lundon de la monatoj je h 18.30: Buterpanoj mendeblas ĉe Ruth, tel 36 46 62 79, aŭ kunportu mem.
*Interreta aliro* kun retbabileja eblo (ordinare je www.gxangalo.com/babilejo/)
Pri la *biblioteko***:** Ni simple elprenis la bindigitajn kaj plej bonaspektajn librojn, kio rezultiĝis en 1/3 de ĝia volumo. RUC ricevis 255 librojn. Nun tiu biblioteko komencis enlistigi ilin. Kiam la projekto finiĝis, ĉiuj povas pruntepreni laŭ 3 eblecoj: rete, en popolbibliotekoj aŭ en tiu de RUC.
Por la venonta *SEA-kunsido* en Kopenhago rezervu sabaton la 2-an de oktobro.

**Kluba raporto**
22/3 *Bona Espero* estas institucio en Brazilo. Astrid kaj Erik montris aktualan videofilmon pri ĝi kaj rakontis. 5/4 Ni ricevis la lastajn *informojn* pri UK en Pekino kaj la 6-a EEU-kongreso en Bilbao. Bent Wiinberg kun la kaskedo de ĉefdelegito disdonis la eltiritajn informojn por ni danoj.
19/4 Ĉiu liveris sian preparitan *vojaĝopriskribon.* Jytte: pri la jaroj kun skotero kiel transportilo.
26/4 Pri la *DEA-kongreso* Henning Olsen liveris la plej ampleksan raporton.
3/5 Kim Henriksen *dancigis* nin per sia akordiono kaj poste aktivigis nian cerbon per gradaltiĝita ludilo.
17/5 La fervojistoj bonhumore revenis el ilia *IFK* en Sopron, Hungario. Ĉiuj el ili rakontis.
24/5 Jan Niemann informis pri *interretaj eblecoj*. Ni ricevis komputilan terminkolekton.

**Kursoj:**
En DEFA/KEK ni decidis, ke la studsezono komenciĝas jam la 13-an de septembro. *Komencantojn* instruas Bent Jensenius ĉiulunde (18.45-19.30 kaj 20.00-20.45). Por *daŭrigantoj* Arne Casper aranĝas legogrupon (temo: La fabeloj de H.C.Andersen). - La *studgrupo* funkcias ĉiun duan lundon – ni daŭrigos la laboron pri la libro de Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando – voĉlegado, tradukado (se necese), diskutado kaj lingvaj interesaĵoj.
La *prezo* por partopreni kurson, legogrupon aŭ studgrupon estas 250 kr –ĝis kristnasko, se oni ne estas membro en unu el la du kluboj (KEK aŭ DEFA). Se oni estas membro, la partopreno estas senkosta. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen kaj Arne Casper.

**SOMEREKSKURSO**




*sabaton 10/7, 11-a horo ĉe la ankro en Nyhavn. La metrostacio estas Kongens Nytorv (de Nørreport S-stacio oni veturas en la direkto Vestamager aŭ Lergravparken). Tie ankaŭ estas haltejo de multaj busoj.*
Ni promenos 6½ km, kio daŭros ĉ. 1½ horon - "En la spuroj de H.C.Andersen" tra Kopenhago kaj Amager.

Je horo 11.15 ni ekpromenu. Duonvoje estas bela ripozloko.

LA ESTRARO
Prezidanto kaj redaktoro
Jytte Sunekaer
Højlundshusene 16
3500 Værløse
Tel: 44 48 47 26
Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk

Kasisto
Arne Casper
Bryggervangen 70, 4. tv
2100 København OE
Tel: 39 20 63 48
Mobilo: 21 40 84 87
Ĝirkonto 202-5558.
arne-casper@email.dk

Vicprezidanto
Bent Wiinberg
Naeldebjerg Allé 30
2670 Greve
Tel: 43 90 42 01
teo@post11.tele.dk

Sekretario
Jens S Larsen
C/o Trillingsgård
Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
Tel: 24 47 50 40
jens_s_ larsen@yahoo.dk


Bent Jensenius
Højstrupvej 124
2700 Brønshøj
Tel: 38 60 15 86
bentjensenius@sol.dk.

Libroservo de DEA
Arne Casper

Ĉe la maro ni konsumas nian kunportitan manĝon. Eblas aĉeti sandviĉon kaj trinkaĵon en proksima kafejo. Ni iru tien poste. – Por la hejmenvojaĝo ni povas promeni 900 m al la Metrostacio Lergravsparken.

***Ĝuu la someron!***





## *Klubo Esperantista de Helsingborgo*

Karaj geamikoj!

Post intensa laborjaro 2003-2004 ni finfine havos feriojn. Kelkaj el ni nur ripozos dum aliaj partoprenos kursojn aŭ aliajn aranĝojn. Ĉi-jare en Svedio okazos eĉ tri someraj kursoj! Sed antaŭ tio, ni ekskursos en la fama Pålsjö skog en norda Helsingborg la 13-an de junio. Kunportu piknikon kaj venu kun ni! Anoncu vin ĉe Ann-Louise (042-186639 aŭ 042-291262) aŭ Barbro 042-121471.

Dum la jaro mi partoprenis tri gravajn kaj promesoplenajn kunsidojn:

1. La SEA-kunveno en marto, kiu jam i  a rezultis en belege renovigita hejmpaĝo www.agado.net. Vi povas legi la raporton de la kunsido en la antaŭa numero de Ponto.

2. La jarkunveno de DEA en aprilo, kun interesaj prelegoj kaj nova, agema estraro.

3. La SEF-kongreso en majo, kun intensaj diskutoj pri i a la statutoj, la sortoj de La Espero kaj la Esperanto-Centro, laborplano kaj lokigo de la SEF-kongresoj. Krome en la estraron estis elektitaj tri tute novaj personoj. Ĉu efikos la proverbo pri novaj balailoj?

Nia kluba agado rekomenciĝos meze de aŭgusto. Vi estos bonvena al la dimanĉa renkontiĝo la 15-an de aŭgusto. (Estus bona ideo kontroli la aferon antaŭ ol veni, ĉar eble la ekskurso en junio tiom bone plaĉis al ni ke ni faros alian ekskurson.) La studrondo ĉe Barbro rekomenciĝos merkrede la 18-an.

Ĝis revido! Ann-Louise

## 70-JARA KEH JUBILEIS



La 21-an de marto la Esperanto-klubo en Helsingborg festis sian 70-jaran jubileon. La klubanoj kaj la gastoj el Kopenhago, Malmö kaj Lund havis amuzan kunestadon en la ejo de PRO.

Ann-Louise Åkerlund bonvensalutis nin kaj legis alvenintajn gratulleterojn. Poste Jill Hilford donis al ni interesan historian rerigardon pri la klubo.

Reprezentantoj por la kluboj en Malmö, Lund kaj Kopenhago gratulis kaj ni ĝuis bonegan manĝaĵon kiun preparis Peter Bankholm kaj ni kune kantis kaj amuziĝis.

Bertil Andreasson

## La Esperanto klubo de Lund

### Karaj geklubanoj!

Kelkaj agrablaj kaj interesaj renkontiĝoj okazis dumprintempe. La 15an de aprilo Ulla Saether kunvojaĝigis nin al tri afrikaj landoj, nome Gvineo Konakrio, Sudano kaj Kenjo. Nur iom pri la unue vizitita lando Gvineo Konakrio, kien ŝi flugis kune kun filino Eva, la genepoj Aron kaj Fatou, kaj i.a. junaj muzikstudantoj. Tiuj partoprenis en la unua danc- kaj tamburkurso de Max, la bofilino de Ulla. Eva kaj li tie konstruis domon por okazigi tiajn kursojn unu- dufoje jare. Granda aventuro por ĉiu estis. Post rakontado sekvis vivoplenaj filmsekvencoj, kiuj konatigis nin kun la svedaj vizitantoj, la granda familio de Max, la muziko kaj dancoj tipaj, sed antaŭ ĉio la filmo montris la manieron de la tieaj virinoj vestigi kolorriĉege. Pri la aliaj du landoj Ulla rakontis helpe de multaj fotoj.

Ni renkontiĝis en la konversacia rondo, gvidita de Daniel Granello. Legu sube pri nekutime interesa kaj kortusa vespero de la 13a de majo. Bonvolu noti ke la pikniko, la 13an de junio NE okazos - pro la ekskurso al Pålsjö en la sama tago, vidu supre pri Helsingborg.

Agrablan someron deziras en la nomo de la estraro

Anna-Maria Lange

### Leon kaj Kristina!

Antaŭ kelkaj semajnoj telefonis min Leon Salomonsson, delonge membro de la klubo en Malmö, kaj demandis min: Ĉu via avo estis John Takman? Mi diris ne, li estis frato de mia avo. Estis tiel ke Leon kaj mia "pra-onklo" studis ĉe Hermods samtempe. John estis i.a. kuracisto kaj politikisto kaj multe laboris por la plej malbonŝancaj. Post interesaj interparoloj mi invitis Leon al nia klubo en Lund, por pli rakonti pri John unu al la alia kaj al aliaj. Ni havis longan, interesan kaj ege agrablan vesperon. Mi rakontis pri lia vivo - aferojn kiujn mi aŭdis kaj legis - sed ankaŭ pri kelkaj memoraĵoj kiujn mi havas de li. Leon parolis pri li de sia vidpunkto kaj ankaŭ donis al ni vere interesajn historiojn pri sia esperanta vivo.

Mi ege ĝojas pri mia nova amiko. Li foje parolas pri la aĝ-diferenco inter ni, sed 62 jaroj estas nenio, ĉu?

Amike, KristinaTakman

| | | |
|---|---|---|
| **Dimance 13.06** | **KEH, Helsingborg** | **Ekskurso** en la fama Pålsjö skog. Kunportu piknikon kaj venu kun ni! Anoncu vin ĉe Ann-Louise 041-186639, Barbro 041-121471 |
| Lunde 14.06 | KEK/DEFA, Kph | La filmo ”Balonfesto” kaj informoj pri somer-ekskurso |
| Lunde 21.06 | KEK/DEFA, Kph | Somermeza aranĝo. Henning preparas surprizojn |
| Lunde 28.06 | KEK/DEFA, Kph | Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi |
| Lunde 05.07 | KEK/DEFA, Kph | Caro Vladimir dua kanto - Astrid kaj Erik distros |
| **Sabate 10.07** | **KEK, Kph** | **Somerekskurso** (vidu en Kontaktilo**)** |
| Lunde 12.07 | DEFA, Kph | Kantvespero. Ni provu renovigi la verdan kantaron. Kim helpos |
| Lunde 19.07 | DEFA, Kph | Karen distros per taskoj pri la naturo |
| Lunde 26.07 | KEK, Kph | Studgrupo pri PARTICIPOJ - apetitilo por la vintra studsezono |
| Lunde 02.08 | KEK/DEFA, Kph | Rakontu pri esperanto-libro, kiun vi legis (eblas prunti bibl.libron) |
| Lunde 09.08 | KEK, Kph | Post la UK– partopreninto rakontas |
| Dimanĉe 15.08 | KEH, Helsingborg | Dimanĉa renkontiĝo kun diversaj programpunktoj |
| Lunde 16.08 | KEK/DEFA, Kph | Ne-planita programo |
| Merkrede l8.08 | KEH, Helsingborg | Studrondo ĉe Barbro |
| Lunde 23.08 | KEK/DEFA, Kph | Ne-planita programo |
| Sabate 28.08 | KEM, Malmö | Tago de la Asocioj en Gustav Adolfs torg |
| Lunde 30.08 | KEK/DEFA, Kph | Ne-planita programo |
| Sabate 04.09 | KEM, Malmö | La bicikla grupo informos en la urbo. Kontaktu Sten Svenonius tel. 040-19 14 77 se vi volas partopreni. |
| Dimanĉe 05.09 | KEM, Malmö | Aŭtuna festo en Beijers park aranĝota de la urboparto. Nia klubo informos |
| Lunde 06.09 | KEK/DEFA, Kph | Post la EEU-kongreso. Partoprenintoj rakontas |
| Merkrede 08.09 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Poste raportoj pri la jarkongresoj en Lesjöfors |
| Lunde 13.09 | KEK/DEFA, Kph | Studgrupoj kaj kursoj (vidu en Kontaktilo) |
| Jaŭde 16.09 | LEK, Lund | Ĉiuj kontribuu per rakontoj pri someraj travivaĵoj |
| Merkrede 22.09 | KEM, Malmö | Membroj rakontos pri siaj someraj travivaĵoj |

Informoj pri horoj kaj adresoj ktp. sur paĝo 6

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

### Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

### La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan
jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h.
en la ejo de nia studorganizo SENSUS,
Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

### Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en
Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe
Barbro Haraldsson tel. 042-121471

### Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn
tie. Prezidanto: Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk
tel. 0045-44 48 47 26

### Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B,
atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport,
salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego
okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas
demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al
Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsvendsen@webspeed.dk

### Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en
Banedanmark, entreprise, Vasabygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ce la (krad)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

## Eniru www.2-2-se kaj legu!

Unu el niaj membroj, Hans Malv, faris je propra kosto grandan laboron por krei informojn pri la diversaj aspektoj de neŭtrala internacia lingvo.
Hans estas kuracisto kaj relative nova esperantisto. Lia deziro estas vaste konatigi esperanton al homoj.
Liaj pensoj pri internacia lingvo estas legeblaj en 15 lingvoj ĉe la adreso [www.2-2.se](www.2-2.se) .

Bonvolu laŭeble helpi nin konatigi lian adreson!

Klubo Esperantista de Malmö
Sten Svenonius (prezidanto)
Karin Lindquist (redaktoro de Ponto)

**SEA:s hemsida**

www.agado.net
är nu uppdaterad!

Sidan innehåller uppgifter om:

**Aktuellt**: program — jubileumskongress i Malmö 2006 - kurser
**Klubbarna i Öresundsregionen**: historik - adresser - kartor hur du hittar till klubbarnas lokaler - medlemsavgifter
**Sundaj junuloj**
**Ponto**: Nya nummer planeras kunna hämtas från hemsidan
**Kontakter, agado-l och länkar** till användbara sidor

*Det är vår ambition att hålla sidan aktuell så konsultera den om vad som är på gång!*